



**Universala
Esperanto-
Asocio**



**Universitata
AGADO**

Estrara Subteamo: MOVADO

Estrara Komunikado EKO 2017-27 sendita el Bengaluro, la 8an de oktobro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alirokroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

Optimismo kun defio en barata universitato

Unu studento demandis: “Ĉu vi estas optimisma pri la estonto de Esperanto?” La respondo estis mikso, en kiu unu el la pozitivaj elementoj estis la kreskoj en la ĉina movado tra la lastaj jaroj. Tio donis perfektan enirpunkton por la defio: “Ĉi tiu lando, Hinda Unio, spertas similan kreskon kaj evoluon, tiel ke la kondiĉoj ekzistos por iom komparebla fortigo de la movado en Barato, se ni nur trovos la aktivulojn por antaŭenigi la aferon.

Ja tiuj demando kaj respondo okazis en la angla lingvo, kadre de prelego ‘Esperanto – lingvo por dialogo kaj paco’, farita de la vic-prezidanto de UEA, Stefan MacGill, al studentoj de la



Universitato Azim Premji en Bengaluro. Tio estas malgranda universitato, kun 800 studentoj kaj 100 instruistoj kun limigita studfakaro: pri la sociaj sciencoj, edukado, sociaj evoluigo kaj politiko. Do, tre konvena studentaro por reagi pozitive al la mesaĝo de Esperanto.

La elektita temo koincidis kun la Semajno de Gandhi, festata tra la lando kaj en tiu universitato. Do, la prezentaĵo tuŝis tiun respektatan sed neprecize

difineblan nocion – la internan ideon. La studentoj estis jam bone informitaj pri Esperanto – kelkaj el ili ja parolas la lingvon kaj partoprenos en la 4a Sudazia Seminario (SAS) post semajno. Ili estas membroj de E-grupo kiu ĉiusemajne renkontiĝas en la universitato sub la gvido de d-ro Giridhar Rao. Do, la nuna prezentaĵo ne devis komenci de la nula punkto, anstataŭe ĝi faris iujn konstatojn



pri la ecoj de la parolkomunumo, kiuj estas malsamaj al tiuj de naciaj aŭ etnaj lingvoj – malmultaj denaskaj parolantoj, alveno al la lingvo pro konscia decido, limigita lingva nivelo pro neintensa uzo, limigitaj infrastrukturo kaj financaj rimedoj ktp.




La partoprenintoj fine de la sesio.

Ĉiuj fotoj krom la unua: d-ro Giridhar Rao

Venis interesaj kaj defiaj demandoj – do dudirektiĝis la defioj – ekzemple pri la motivoj aŭ kialoj por homoj okupiĝi pri la lingvo, kaj la limigitaj plustudaj ebloj por altigi siajn konojn. Entute interesa kaj stimula sesio, kiu ja estis filmita. Kun kelkaj el la studentoj la diskuto daŭris en suba manĝejo, parte en Esperanto, interalie pri la planoj por la 4a SAS.



Pri la E-agado en tiu universitato, unika en Barato, la tutmonda movado ne estas sufiĉe informita.



Informilo pri la 4a Sudazia Seminario – la artaĵon pretigis esperantisto, s-ro Juny Wilfred, kiu mem partoprenos en la 4a SAS. Dekstre estas la ŝlosilo pretigita por uzo en Barato, kiu estis disdonita fine de la prelego kaj estas disdonota en la 4a SAS. Foto: SMG

=====
Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/>.

Aperintaj komunikiloj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content>

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>[gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com)>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedistoj.